Vijfde Jaargang, Nummer 9 Verschijnt elke veertien dagen 13 Mei 1933

LABORISTA ESPERANTISTO
ARBEIDER ESPERANTIST

ORGAAN VAN DE FEDERATIE VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

Abonnementsprijs f 1,25 per jaar. Voor leden gratis. Prijs losse nummers f 0.05 per eksemplaar. Oplaag 3200 eksemplaren.

NA ONS KONGRES



Geen kongresverslag is 't wat we hier laten volgen, dat vindt men verderop in de taal der toekomst, de taal, die we gewoon zijn ook in onze nederlandse kongressen te gebruiken en in geheel ons organisatieleven, doordrongen als we allen ons voelen, van het begin van ons esperantist zijn af, van de eigen geest, welke aan het esperanto ten grondslag ligt.

Esperanto is niet slechts een taal alleen, het is een beweging. Zoals een nationale taal, een dialekt, verklonken is in het volk, zo is het esperanto onverbrekelik verbonden aan een ruimere wereldbeschouwing, zonder horizonten, waarbij de blik zich in de eerste plaats richt niet naar het eigene, bekende, maar naar het vreemde, onbekende. Internationalisme daardoor bevorderd, zal leiden tot het sennaciisme. Een ruimere geesteshouding zal hier ongetwijfeld mede gepaard gaan. Mocht deze, ook bij ons arbeiders-esperantisten, nog niet overal merkbaar zijn en onze kongressen nog niet het toonbeeld zijn van „supertendenceco", naarmate we voortschrijden en onze beweging sterker wordt en we ons gezamenlik doel intens nastreven als esperantisten, dan zal, naar we hopen, ook de „tendenz" niet de boventoon voeren, waaruit zo gemakkelik het tegendeel van kameraadschap ontspruit.

Het spreekt echter vanzelf, dat aan een zeker richtsnoer moet worden vastgehouden en niet kan worden toegegeven aan herhaaldelik opkomende drang naar taktiekwijzigingen bij een nog betrekkelik jonge beweging als de onze. Bij alle ups and downs (op- en neergangen) komen biezondere wensen en richtingen naar voren, waaraan toe te geven, gevaarlik kan zijn. Zeer zeker mag daarvan geen sprake zijn als een organisatie gezonde groei vertoont. En dat blijkt bij ons het geval te zijn.

Ook nieuwe ideeën moeten inburgeren en de tijd gelaten te worden om zich te verwezenliken.

Dat SAT de wereld nog niet veroverd heeft in de enkele jaren van zijn bestaan, in een tijd, dat aan alle internationale lichamen een geweldige knauw wordt toegebracht, bewijst niets tegen de noodzakelikheid van zijn bestaan en het nut van wederzijdse samenwerking.

Als zodanig was het plicht en goed gezien van het kongres, de apeldoornse resolutie te handhaven, welke nu te steviger staat, omdat men haar nu een jaar rustig heeft kunnen beschouwen en toetsen.

Het besluit, dat voortaan de federatieleden ook Sennaciulo, het maandeliks orgaan van SAT, zullen ontvangen, is van grote betekenis.

Daarmee zullen onze leden hun blik en kennis belangrijk verruimen en de band met de wederlandse kameraden hechter doen worden. Wellicht zal ook SAT daar wel bij varen, waar het lidmaatschap van deze organisatie door dit besluit, door een lagere kontributie vergemakkelikt wordt.

Het is een besluit ook, dat iets zeggen moet tot alle niet-esperanto-organisaties, als men bedenkt, dat alleen *onze leden* een *inderdaad* internationaal orgaan zullen ontvangen, dat zij dan ook inderdaad kunnen lezen, waarin zij zich kunnen uiten en rechtstreeks met taalgenoten uit verscheidenerlei landen diverse vraagstukken kunnen bediskussieeren.

Iets waartoe zelfs de grootste en best uitgeruste organisatie niet in staat is.

Het zij hun ter overdenking.

Dat wij dit bestaan, moge eveneens spreken tot de overige esperanto-organisaties, die dit probleem t. o. hunner pers wel wilden, maar niet vermochten op te lossen.

En deze beroepen zich dan op historiese rechten enz. om onze bloeiende beweging ten achter te stellen. Betreffende het Eksamen-Komitee stond dan ook het kongres achter het Federatiebestuur.

Groei bleek overal in onze gelederen, ook van het organisatie-apparaat. De versteviging daarvan door het stichten van provinsiale distrikten en een Federatieraad werd dan ook volkomen door het kongres onderschreven.

Onze uitgaven zo wel van leer- en propagandamiddelen nemen in kwantiteit voortdurend toe. Aktiviteit is overal waarneembaar. Onze persdienst begint zich reeds te ontwikkelen. De vijf biblioteken der Federatie worden goed gebruikt. Alle provinsies beginnen met behulp der Federatie eigen tentoonstellingsmateriaal aan te schaffen.

Tienduizenden eksemplaren van ons propagandanummer van L. E. gingen het land in en waar maar gewerkt wordt leent men voor esperanto het oor. Een onzer afdelingen, welke door een abuis 1500 eks. van ons orgaan ontving inplaats van vijfhonderd, verkocht niettemin in een halve dag alle toegezonden kranten.

Bezien we dit alles, zomede onze gezonde finansieën en het opgewekt afdelingsleven, dan vertrouwen we, dat de lezers dezer regelen, die nog niet behoren tot de altijd ijverige en onvermoeide kern, zullen gaan inzien, dat de arbeidersbeweging en het sosialisme dan goed gediend zijn als zij zich scharen bij hen, die tot leuze hebben: door esperanto, voor 't sosialisme.

De vertegenwoordigers der arbeidersorganisaties hebben door hun afwezigheid wederom een gunstige gelegenheid laten voorbijgaan, daar ze hier hadden kunnen zien hoe zelfs arbeiders van één taalgemeenschap, zich in hun bijeenkomsten van esperanto bedienen.

Ongetwijfeld zal dit, ons tweedaagse kongres, dat een goed kongres was, zijn vruchten uit dragen.

Moge het bijgedragen hebben tot versterking der kameraadschap en gezamenlik optreden.

RAPORTO

pri nia 18a kongreso okazinta la 16an kaj 17an de aprilo 1933 en Amsterdam

Je la 12a kdo Liedermooij bonvenigas en la nomo de la distrikto amsterdama la kongreson kiun vizitas 60 sekcioj kaj 400 membroj kaj deziras al ĝi plenan sukseson. Post kantado de la Internacio la prez., kdo Faulhaber, malfermas kaj bonvenigas ĉiujn, precipe la 15 novajn sekciojn kiuj la unuan fojon ĉeestas nian kongreson. Li plue skizas la iradon de la Federacio dum la pasinta jaro; la ekonomia krizo furiozis minacante detrui la kulturajn instituciojn de la laborista movado. Estis malfacile konduki la federacian ŝipon dum la ventegoj de la kriza tempo. Kvankam ni havis, kiel ĉiam, neplenumitajn dezirojn, ni tamen ne tro malbone suksesis. La nuna nombro de la novaj sekcioj superas la nombron de la novaj sekcioj dum la antaŭa kongreso. Nia Federacio kreskis per 600 membroj. La nombro da sekcioj per 15. Sed ĉu tiu nombro en pli normalaj cirkonstancoj ne estus pli alta? Aparte menciinda estas la kresko de nia organizo en Flandrio, kie ni nun havas 5 sekciojn kun sume 74 membroj. Ni konsideru, ke multaj devis retiri sin, ĉar ili ne plu povis pagi sian kotizon pro senlaboreco. Pli ol 3000 personoj partoprenis niajn pasintvintrajn kursojn; ankaŭ inter ili estas multaj, kiuj ne havas laboron. La idealo, kun kiu ili konatiĝis, donis al ili novan impulson, por resti starantaj kaj ne perdi la esperon pri tempoj venontaj. Nur tiel estas klarigeble, ke senlaboruloj entuziasme aliĝas, kiel i.a. faris amsterdamaj kontoristoj, kiuj fondis grupon kaj aliĝis al la Fed. kiel sekcio. (Aplaŭdo).
Gekdoj, espero ne estas nur la radiko de la nomo de nia lingvo, ĝi ankaŭ estas la radiko de nia movado!
Esperanto enpenetras pli kaj pli en la laboristaron kaj nia pozicio, kiel esperantista organizo en la regiono de la nederlanda lingvo pli kaj pli fortikiĝas. Momente ni estas la plej grava esp. organizo en Nederlando, ne nur rilate la membronombron, sed ankaŭ en aliaj rilatoj ni fariĝis la plej grava societo, kvankam oni klopodas de certa flanko malgrandigi la gravecon de nia organizo.
Nia organo „Laborista Esperantisto" estas la plej ampleksa kaj plej ŝatata esp. gazeto. Dum sur nia tagordo estas proponoj por konservi ĝin kiel dusemajnan, aperis sur tiuj de LEEN kaj NK proponoj forigi la organon, ĉar ĝi ne estas interesa kaj kostas tro multe da mono! Nin ne ĝojigas tio, kontraŭe, ni tre deziras, ke ĉiuj organizoj posedu taŭgan organon, ĉar inter iaj „eminentuloj" regas forta tendenco malatenti iujn esperantajn organizojn kaj emo por private aranĝi la esperantajn aferojn. Ni nomu la Cseh-Instituton, la malnovan E.K. kaj la Skriban kurson de Nijmegen. Sed ni, kiel organizo, ne povas toleri ilian emon dikti la leĝojn; ni ne lasas nin ignori. Tre klaraj ekzemploj en la lasta tempo estas la teniĝo de la E.K. kaj cirkulero, kiun la eldonejo Thieme & Co. eldonis pri sia nova vortaro. La organizojn ili ne kalkulas! Ke nia federacio eldonis 3000 lernolibrojn kaj 3000 ekzemplerojn de „La Konsilanto" oni ne kalkulas! Tio estas ofendo por ĉiu organizita esperantisto, ofendo por ĉiu ano de nia Federacio! Tial ĉiu sciu, ke nia organizo okupas nun la unuan lokon. En la faritaj laboroj elstaras unue la sennombraj kursoj, kiujn sindoneme gvidis multaj niaj kdoj; due la eldono de dekmiloj da flugfolietoj, fenestraj biletoj, la broŝuro „Esperanto en la lernejo"; „Het Arbeidersesperantisme"; „Nia Lernolibro" kaj „La Konsilanto". Niaj rilatoj kun SAT estas tre bonaj kaj el tiuj rezultis nia kunlaboro en la eldono de „Gvidilo tra la Esperanto-movado", kaj „Fremdvortoj en Esperanto". La fondiĝo de la Ekzamena Komitato devis okazi post preskaŭ dujara vana batalo por demokratiaj rajtoj en la malnova komitato.

Kun la kresko de nia organizo kreskis la laboro kaj respondeco de la federacia estraro kaj montriĝis necese dividi la laboron, respondecon kaj gvidadon trans la tuta regiono de nia Federacio, kio okazis per la fondo de la Federacia Konsilantaro, elektata de la Provincaj Distriktoj, kiujn ni starigis por pli itense gvidi la propagandon. La fondiĝo estas ĝojiga fakto kaj espereble la menciitaj instancoj grave malŝarĝos la estraron.
Unu el la laboroj farotaj de la distriktoj estas organizi kun ni la funkciigon de la „Gazetservo". La malnova aranĝo ne povis kontentigi nin. Tial ni decidis jam nun ekfunkciigi propran, kvankam momente sole flanke de la estraro. Sed nia celo estas, ke ĉiuj provincaj distriktoj organizu ĝin kune kun ni, por ke ni baldaŭ havu reton da kunlaborantoj, el kiu eĉ ne unu gazeto povos forgliti.
Nia federacio estas sana, vigla organizo, sed tamen bezonas ĉies atenton kaj zorgadon. Esprimante le deziron, ke ĉi kongreso kontribuu al ĝia plua progresado kaj, ke la kongreso fariĝu laborkongreso la prez. malfermas la 18an kongreson.



SALUTOJ.
Ensendis siajn salutleterojn la Esperantistaj organizoj el Riga, Formosa (Japanio), Los Angelos, Anarkiista Grupo el Stockholm, la Nederlandaj sindikatoj: CNAB, NVV, Bond v. Onderwijzers kaj Land. Fed. van Bouwvakarb. Salutparolas kdoj Wessels por la Antimilitistoj, I. de Lange por NASB, Elferink por De Dageraad, v. Loon por IFETT kaj Israels por Nosobe.
Al demando ĉu ne envenis salutletero de IPE, la prez. respondas, ke ni ne laŭtlegas leterojn de al ni malamikaj organizoj, kiuj krome eĉ ne estas subskribitaj.

Ne ĉeestas la sekcioj: Aalsmeer, Antwerpen, Coevorden, Enkhuizen, Kerkrade, Leiden, Ostende kaj Zutfen, tiel ke ĉeestas 60 sekcioj el kiuj 58 voĉdonrajtaj. Tri ĝeneralaj membroj ĉeestas kaj krome pli ol 400 vizitantoj. Por la voĉdonkomitato estas elektataj kdoj De Regt, Hogedoorn kaj Huibrechts.

Pritraktado de la raporto de la Fed. estraro.
A'dam VI diras, ke estas inter ĝia membro Wessels kaj la fed. estraro kelkaj malagrablaĵoj. Tiu membro, unue defendis Orchudesch kaj poste montriĝis, ke li, Wessels, estis trompita, sed la fed. estraro ne rajtis rifuzi lian artikolon, en kiu li protestis kontraŭ la eksigo de Orchudesch, ĉar tiam la fed. estraro ankoraŭ ne sciiĝis pri ties IPE-membreco, kio montriĝis el la IPE-kalendaro, eldonita en decembro. La fed. estraro ne rajtis rifuzi transdoni al li la Libro-Servon, pro tio, ke li estas opoziciulo. La skribmaniero de la sekr. estis ofenda. Li legas kelkajn frazojn el leteroj senditaj de la fed. estraro. Li ankaŭ protestas kontraŭ la fakto, ke la financaj aferoj, la administrado kaj Libro-Servo estas en unu mano. Tio ne estas ĝusta. Ni ne forgesu, ke nia organizo havas federacian formon kaj ni nepre ne centralizu ĉiun laboron. La kongressalono tute ne taŭgas, ĝi estas tro malgranda, multaj kdoj devas esti rifuzitaj.

Hillegom (Brauckman) opinias, ke la afero pri la eksigo estas iom stranga. Kdo Orchudesch ricevu la permeson eniri, li troviĝas antaŭ la pordo. Estas dezirinde, ke li estu aŭdata de la kongreso. Ni atentu nian federalisman formon, la sekcioj do havas aŭtonomion. La eldono de „Arb. Esperantisme" montris, ke la fed. estraro estis aktiva ankaŭ rilate eldonadon, sed la fed. estraro antaŭ ol ĝi eldonas ion, havu la konvinkon, ke ni povos tion vendi. Ŝajnas, ke la estraro ne havis tion rilate al ĉi tiu broŝuro, ĉar ni kelkfoje legis, ke la forvendado ne bone marŝas.

En tiu ĉi tempo estas necese, ke ni formu unuecfronton kun ĉiuj laboristaj organizoj esperantistaj. La salono tute ne taŭgas, ĉar multaj kdoj estis resenditaj, sed se ne estas pli granda li reprenas la riproĉon.

La Prez. respondas pri la afero Orchudesch, ke ni malakceptas la riproĉon de A'dam VI kaj Hillegom rilate al la eksigo. Ni ne estus tiel naivaj peti al iu, ke li montru la membrokarton, se ni deziras scii, ĉu tiu persono estas ano de iu organizo. Ni rigardas ne la vortojn, sed la farojn kaj tiuj de Orchudesch sufiĉe pruvis, ke li apartenis al la opozicio kaj se estas io stranga en nia tenado, tiam tio estas nia pacienco, ĉar, se ni ne estus tiaj, Orchudesch jam de longe estus eksigita. Kaj la kongreso sciu, ke la kunveno de la Fed. Konsilantaro, kie la afero estis larĝe pritraktata, plene aprobis la sintenadon de la estraro. Se la kongreso ne konsentas, tiam estas ĝia devo elekti aliajn estraron kaj konsilantaron. Ne estas vere, ke kdo Koch sole estras tiom dafakoj. Li faras ĉion kun la 2a kasisto kdo Kroonder kaj kun sia edzino. Estas memkompreneble, ke ni ne povas doni la Libro-Servon al neestraranoj, ĉar la estraro estas kaj restas responda kaj la kongreso prave risproĉus nin en okazo, ke ni estus farintaj ion tian. Ni eĉ ne povas pensi pri la enlaso de Orchudesch, kiu ne estas membro de nia Federacio. Pri la broŝuro „Arb. Esperantisme" ni kalkulis je la forto de niaj membroj, kiel ni iam faris kaj faros ĉe la eldono de io ajn sed kelkfoje la membroj lasis nin, kio ankaŭ kelkfoje okazis rilate al la eldono de flugfolietoj kaj nia 1a de majo-numero de L.E. Ĉu tio signifas, ke ni ne plu eldonu flugfolietojn aŭ majan gazeton? Ni opinias, ke ne. La amsterdama distrikto faris ĉion eblan por havigi al ni taŭgan salonon kaj post multaj klopodoj sukcesis lui ĉi tiun salonon. Aliaj salonoj estas aŭ ne plu neokupitaj aŭ tiel multekostaj, ke ne eblas al ni pagi. Montriĝis ke maksimume al 40 kdoj devis estis rifuzita la eniro el kiuj kelkaj pro malfrua mendo.

La Fed. Sekretario, kdo Veen diras, ke oni povas helpi en la laboroj diversmaniere. Unu maniero estas veni ĉe iu estraro kaj fari tion, kio necesas: alia maniero estas paroladi, paroladi kaj paroladi, opozicii kaj kritikadi ĝis kiam estrarano rekritikas kaj perdas sian paciencon. Wessels nur citis kelkajn frazojn, kiujn li momente provis uzi. La fed. sekretario tute ne prezentis al li transpreni la Libro-Servon, li nur rimarkigis, ke la Libro-Servo forprenadas multe da tempo kaj nur demandis, ĉu ĉiu estus preta disponigi preskaŭ sian tutan hejmon por la Federacio. Wessels ne ŝatis labori ĉe Koch hejme, sed nur volas havi ĝin en sia hejmo, dum la fed. estraro restus portanta la respondecon. Kiam ni pasintan semajnon petis kandidaton por fed. estrarano, la sekcio A'dam VI respondis, ke ĝi ne havas. Al demando kial Wessels fariĝis membro de la Federacio li ne respondis, sed mi respondus al vi, se vi farus la saman demandon al mi, ke mi aliĝis por pligrandigi nian movadon. Vi diris, ke vi faris tion kaj tion, sed rezulton vi ne povis montri.

Alings por la estraro aldone diras, ke, se ni jam antaŭe devis esti certaj pri la rezultoj, ni neniam povus ion eldoni. Pri „Arb. Esperantisme" ni atendis, ke ĝi estos forvendata, sed tio ne bezonas okazi tuj; la broŝuro ĉiam restas plene valora. Ni presigas regule duoblajn kvantojn por pli malaltigi la prezon. Nur necesas, ke ni kiel eble plej rapide reenspezu preskostojn, tiam ni povas fari aliajn laborojn per tiu mono, kaj de la profito ni ankaŭ entreprenas novajn aferojn kaj havigas al ni certan kapitalon. Wessels kritikis ŝajne nesciante pri la afero. Kroonder restas ĉiam malantaŭe, sed multe laboregas. La adreso de la L.S. estas je la

nomo de Koch, ĉar la libroj estas en lia hejmo. Estas tre naive unuflanke kulpigi la Fed. estraron pri diktatoreco kaj aliflanke deziri, ke la estraro diktatore alplenigas sin per nova estrarano, ĉar nur estrarano povas sin okupi pri tia afero, kia estas la L. S. Al opoziciulo oni kutime neniam donas gravajn aferojn, ĉar en okazo, ke tiu foriras, tiu forprenas ĉion kaj la organizo estus senigita de grava parto de sia havaĵo. Se Wessels estus elektita en la estraro ni povus doni al li tian gravan taskon; nun ni estus respondaj pri tio kaj ne havus la eblon en la estrar-kunsidoj kontroli aŭ doni instigojn ktp. Se ni ne agus laŭ la federacia organizformo la aliaj sekcioj certe protestus. Laŭ Wessels federalismo signifas havi la rajton ĉiel kaj ĉiam kritiki. Rilate al unuecfronto estu dirate, ke oni jam antaŭe nomas nin socialfaŝistojn, sekve oni devus ne ŝati kunlabori kun ni. Orchudesch estis eksigata laŭ la apeldorna rezolucio. Nun li klopodas kredigi, ke li estas la sekcio A'dam VIII kaj petis enir- kaj delegitkartojn. Ni bone sciis, ke li estis IPEano, ni havas ĉie ajn la fadenetojn, krome montriĝis, ke ni bone antaŭvidis, kaj oni devus laŭdi nin pro tio.

5 kdoj petas la parolon. Enschede proponas limigi la paroltempon. La kongreso decidas doni al ĉiu parolanto 2 minutojn. A'dam VI protestas, ĝi bezonas pli ol 2 minutojn.

Wessels diras, ke li nur citis kelkajn frazojn, sed povas citi multajn. Ne estas juste, ke membroj devas foriri pro la apeldorna rezolucio, ili devas havi la rajton sin defendi en la kongreso. Nia sekcio ne havis kandidaton, ĉar ankoraŭ estas la problemo de la plenumkomitato de SAT.

La prezidanto: Via tempo pasis, la parolon havas Hillegom. Wessels daŭrigas kaj la delegito de Hillegom silentante montras sin solidara. El la kongreso venas multaj protestoj kaj la propono doni al A'dam VI pli longan tempon.
Tiu propono estas malakceptata.

Hillegom petas enirrajton por Orchudesch. Vi, estraro, petis fidon, ni rigardu al Germanio, kie oni tro fidis. (La kongreso protestas). Ni voĉdonu pri la eniro de Orchudesch.
A'dam VIII diras, ke Wessels informigis sin de unu flanko, li ne venis al la sekcia estraro, nur al la eksigitoj. Bona respondo al Wessels estos, ke ni akceptu la 27an proponon.
Haarlem deziras scii de kiu flanko diskoniĝis, ke Agosti fariĝis ano de NUK. Tiu nur ne simpatias kun SAT kaj ne deziras detrui, nur konstrui.
La prez. respondas al Hillegom, ke ni ne povas voĉdoni pri eniro de neano.
Veen respondas al Haarlem kaj demandas, ĉu estas vere, ke Agosti diris en membrokunveno, ke oni pro la Apeldorna rezolucio devus eksigi lin.
La prez. petas la kongreson sin esprimi pri la raporto de la sekr. kaj pri la gvidado de la fed. estraro.
Ambaŭ estas aprobataj. Neniu kontraŭ, nur Hillegom sindetenas. La kongreso paŭzas.

★

Je la 14.45 la 2a kunsido komenciĝas. Prezidas Krijt.

RAPORTO DE KASISTO KAJ BUDĜETO.
v. Praag de la kaskontrolkomitato diras, ke Wessels malprave diris, ke nur unu persono estras la financajn aferojn. Krom gekdoj Koch kaj Kroonder ankoraŭ ekzistas kaskontrolkomitato, kiu konsistas el 3 personoj, la aferoj do estas sub kontrolo de 6 personoj. Kelkajn rimarkojn pri la financoj Alings respondis.
La kongreso aklame aprobas raporton kaj budĝeton.

★

LIBRO-SERVO.
A'dam II deziras informojn pri la granda ŝuldo de la sekcioj al la Libro-Servo. Tio tute ne plaĉas al ĝi.
Hago II: Ni ofte aŭdas kritikon kaj ĉiam akran sed ni devas konstati, ke de la Fed. estraro estis farata multa kaj grava laboro do esprimas sian dankon pro tiu laboro precipe pro la lastaj eldonoj ktp; li aprobas la agadmaniero de la estraro kaj ankaŭ la lingva paĝo en L. E. meritas nian plenan aprobon.
La prez. respondante diras, ke estas vere ĝojo, aŭdi post la atakoj la laŭdojn. Estas facile unu matenon kritiki, sed malfacilege tutan jaron konstrui kaj fari akurate sian laboron. Unuecfronton ni bezonas, sed nur de laboruloj kaj li dankas por la estraro pro la montrita fido.
Alings respondas, ke la sumo de la ŝuldoj estas sufiĉe granda rilate al la tuto. Ni jam multe instigis regule pagi. Sed ni atentu, ke en tiu sumo estas kalkulita la ricevota mono por „Nia Lernolibro", kiu post 31 Dec. estos aŭ eble jam estas pagita. Ni atentu, ke dum la kresko de nia movado ankaŭ tiu sumo pligrandiĝos, tamen la sekcioj pli regule pagu! La gvidado de la L. S. estas unuanime aprobata.

★

PROPONOJ KAJ AMENDOJ.
La prez. proponas, ke ĉiu parolanto nur unufoje parolu kaj se estos multaj ni limigu la paroltempon. Konsentite. Ni pritraktos la proponojn kaj amendojn kune.
Propono 1.
Stadskanaal tre aprobas la proponon, sed prefere laŭ amendo *d.*, alie L. E. aperos tro malofte, sed tio verŝajne dependas de la monstato de la Federacio. Li lasas la aranĝon al la Fed. estraro.
Hillegom tre laŭdas L. E., estas nepre necese, ke ĝi aperu dufoje monate, ĝi nun ja ne estas sufiĉe ampleksa, ĉar eĉ kongressciigoj devis esti rifuzitaj. Hillegom ne kuraĝas peti dufojan aperon en unu monato kaj krome S-ulon sed ne estas kontraŭ S-ulo.
Haarlem volas unue laŭdi la Fed. estraron; li preskaŭ ploras, se L. E. ne povas aperi trifoje en monato. Ni ne povas malhavi „Taalblad". Kie ni devos konigi la grupsciigojn? Se oni ne akceptas amendon *d.* ni havos gazeton, kiun nur 600 el niaj membroj povos legi.
Zaandam ne volas, ke L. E. aperu unufoje monate, ĉar en la somero ĝi estas ilia nura ligilo kun la membroj. Ankaŭ li defendas amendojn *d.* kaj *c.*, por ke ni ne estu tro firme ligitaj, se montriĝos, ke la afero ne bone iras.
Arnhem ĝojas, se S-ulo venos, sed L. E. ne foriĝu, do la decido pri plidaŭrigo de la aranĝo okazu en la kongreso en 1934.
Hago II esprimas sin por, dirante, ke ni devas esti forte ligitaj kun niaj eksterlandaj kdoj. Ni unue estas internacia movado; ĉe multaj kdoj mankas la mono por sin aboni je internacia gazeto, sed ni provu tion dum unu jaro kaj tiam denove decidu.
Hago III samopinias kun Hago II.
A'dam X demandas, ĉu ni ne perdas la kontakton kun la simpatiantoj de nia movado.
R'dam I opinias ke ne estas multaj membroj kiuj ne povas legi S-ulon, tio estus honto por nia organizo, sed bedaŭras ke L. E. devos aperi unufoje monate, sed tio verŝajne dependas de la monstato. Li petas ankoraŭ informon pri la SAT-kotizo, kaj ebla duobla alsendo de S-ulo.
Faulhaber ĝenerale respondas. Aŭdante la klopodojn konservi L. E. en ĝia nuna amplekso, li deziris, ke multaj LEENanoj ĉeestu. Per ĉi propono ni volas ligi niajn membrojn al la internacia movado. Pri amendo *a.* se eble laŭ la financa stato ni ĉiam estos pretaj fari tion. Malpli bona kvalito de la papero ne donas profiton, nur se ni havos 10.000 abonantojn. La sekcioj zorgu, ke ni havu tion. La sekcioj ne bone zorgas pri tio, ni havas 3000 kursanojn kaj kie restas la abonantoj? Tre malmultaj kdoj kolportadas ĉe demonstracioj kaj en kunvenoj.
Amendo *b.* Estas ŝajne egale, sed dufoje 4-paĝa kostas pli ol unufoje 8 paĝa. Se ne plaĉos, ni kompreneble nuligos le decidon sed se ne venos plendo ni ne metos tian proponon sur la tagordon.

Alings kiel redaktoro de L. E., diras, ke multaj plendis, ĉar ne aperis sufiĉe da esperantaj artikoletoj en L. E., sed tio ne estas preferinda, ĉar L. E. unualoke estas propagandagazeto. Rilate al la elekto de internacia gazeto estu rimarkite, ke estas nur malmultaj interesaj. La gazeton Heroldo ni nepre malabonu, se ni havas ĝin, pro ĝia deklaro pri la persekutoj en Germanio. Nur restas por ni konsiderinda S-ulo. La konvencio ne estas kontrakto. La propono ne estas malkonstruo, sed konstruado al nia celo. Artikoloj nur estis mallongigitaj en okazo, ke ili tro malfrue envenis kaj, se ili ne plu havis valoron por la sekvonta numero, ili ne estis presitaj. Nur unu klarigo ne aperis, sed ĝi estas artikolo. Se ni enmetus ĝin, certe venus aliaj kaj la gazeto ne plu estus propaganda, sed disputa gazeto. S-ulo estas inda al nia intereso, kaj ne devigas al la individua membreco de SAT. Pri eventuala perdo de kontakto estu dirite, ke ni ne havas multajn abonantojn kaj la plej multaj estas kursanoj.
Stadskanaal demandas, ĉu tute ne eblas aperigi L.E. 14tage kun S-ulo. La prez. donas ankoraŭ kelkajn klarigojn.
Haarlem proponas prokrasti la aferon ĝis la sekvonta jaro. La prez. ankoraŭ atentigas, ke la kunveno de la Fed. konsilantaro plene aprobis la proponon. La kongreso akceptas la proponon per 1510 kontraŭ 158 voĉoj.
Kongresurbo.
La sekr. por Belgio nun proponas elekti kiel kongresurbon por 1934 Antwerpen; ni verŝajne estos akceptataj en la urbdomo kaj ni jam en la pasinta kongreso duone elektis Antwerpen. La propono estas aklame aprobata.
La prez. proponas nun fini kaj morgaŭmatene daŭrigi la kongreson.

★

2a TAGO.
3a kunsido.
Prezidas Faulhaber. Envenis salutletero de LEEN. La kongreso kantas „Fratoj al Sun". La sekr. kontroladas la ĉeeston de la sekcioj. Kelkaj neĉeestas. Krom la neĉeestantaj sekcioj de la antaŭa tago, nun ankaŭ forestas Deurne kaj Gorkum. Denove la salono estas plena de vizitantoj.
Propono 2.
La prez. klarigis la aferon, dirante, ke preskaŭ ne estas eble sufiĉe bone administradi. Ĉiutage envenas aliĝoj kaj eksiĝoj kaj ni volas limigi tion. La amendo estas ŝajne prava, sed nenion efikas; la novaliĝinto deziras, ke li ricevu L. E. tuj post la aliĝo, sed la eksiĝinto ricevus ĝin ĝis la fino de la kvaronjaro, eble ne plu pagante kotizon. Tiel la fed. devus liveri la gazeton senpage. Oni ĉiam deziras, ke ni faru kiom plej eble, sed oni tiam havigu al ni la bezonatan monon. La kongreso atentu, ke por sekcioj la sumoj estos malgrandaj, maksimume 35 c. por eksiĝinto, sed por la Fed. la sumo fariĝis grandega. Se iu intertempe eksiĝas oni povas almenaŭ klopodi enkasigi la kotizon por la Fed. Pro la amendo la propono perdus tutan sian valoron. tiel ke la estraro malrekomendas ĝin. Delft subtenas la amendon. La sekcio ĉiam mendas kromkvanton de L. E., do povas doni tiujn al la novaliĝintoj.
Hillegom principe konsentas, sed la malbona tempo malpermesas, ĉar ni ne povas peti de senlaborulo, ke li restu ĝis la fino de kvaronjaro. La kongreso malakceptu ĝin.
R'dam I ne kontraŭ, sed preferas la amendon, kiu ne estos malhelpo por la administrado. Ŝajnas, ke la propono venis pro financaj kialoj. Ni povos enskribi ĉiutage, kial ne elskribi?
Hago III estsas kontraŭ, ĝi estos malprofito por la sekcioj. La sekcio aliĝas la kursanojn al la Fed., tuj kelkaj foriras kaj le sekcio devus pagi la kotizon. Ĉu la estraro favoras nian proponon aliĝi ĉiujn kursanojn?
R'dam V estas kontraŭ. De senlaboruloj ni petas nur la Fed. kotizon kaj ni havas multajn senlaborulojn. Ni povas diri, ke ni pagi-

gas la kotizon de la eksiĝintoj, sed ne faros tion, sekve la sekcioj suferas la malprofiton. Li povas akcepti la amendon.

Alings respondas, ke ni ĉiam rigardas la financan flankon. La Fed. estraro povas fari nenion sen mono. Malriĉaj sekcioj kaj distriktoj petas monan subtenon aŭ senpagajn propagandilojn kaj la estraro helpas ilin same kiel niajn ĝeneralajn membrojn, sed por tio bezonos monon. La sekcioj klopodu aliĝi al si la sekciojn de sindikatoj kaj aliajn organizojn; ofte oni donas senpagan instruadon al sindikatanoj, do aliĝpeto certe estas pravigita. Ni tamen ne prezentis la proponon unue pro la financoj, oni pripensu, ke ĉe kelkaj societoj aŭ sindikatoj la membreco validas por tuta jaro. Ne ĉiuj sekcioj aĉetas kvanton de L. E. kaj nepreferinde estas, ke oni aliĝu la kursanojn al la Fed., ĉar ni tiel ĉiam malkreskas anstataŭ kreski; la sekcioj abonigu la kursanojn je L. E.
La propono estas aprobata, sen la amendo, per 881 kontraŭ 745 voĉoj.

Propono 3.
Hoek van Holland estas por, Hillegom kontraŭ, ĉar ni ne povas peti duoblan kotizon de la kursanoj. A'dam VI: Ĝi estos ĉiujara propono, sed ne meritas la pritraktadon. Hago IV unufoje faris la samon, sed ĝi ne estis bonefika. R'dam I samopinias kun Hago IV Delft aprobas kaj Wormerveer malrekomendas ĝin, same kiel Zaandam. Hago III reprenas sian proponon.

Propono 4.
La prez. sciigas, ke montriĝis, ke ne ĉiu membro havas membrokarton, kvankam tiurilata propono en nia R'dama kongreso estis akceptata. Tiu ĉi propono volas forigi la ĥaoson. Post kelkaj informpetoj Alings respondas, ke la prezo estos verŝajne 10 c., sed la sekcioj ricevos rabaton, krome oni atentu, ke ni presigos pli ol ni tuj bezonos, do ni ne tuj rericevos la tutan sumon. La kongreso akceptas la proponon. Neniu kontraŭ.

Propono 5-a ĝis d.
La prez. klarigas, ke propono *a.* estis necesa, ĉar montriĝis, ke kelkaj sekcioj ne komprenis sian moralan devon, eĉ okazis, ke sekcio ne respondis eĉ ne al rekomendita letero. Arnhem informpetas, ĉu jam ne ĝis nun la redaktoro estas estrarano? Rilate 5 *d.* ĉu ne estus pli bone, ke disiĝo aŭ eksigo okazu en interkonsento kun la Fed. Konsilantaro? Hillegom estas por propono 5 *c.* se ni aldonos „en wordt aan het bestuur toegevoegd", tio estas preferinda ankaŭ pro tio, ke nun para nombro da anoj troviĝas en la estraro, kio povos kaŭzi malfacilaĵojn dum voĉdono. Rilate al 5 *d.*, ni pli bone atentu, ke la sekcioj estas aŭtonomaj, la vortoj „of afscheiding" estu forigitaj.
Alings respondas, ke propono 5 *c.* celas reguligi la aferon. Neparan nombron da estrananoj ni ne bezonas, ĉar ni neniam voĉdonas. La proponoj estas aprobataj. Kontraŭ Arnhem, A'dam XIV kaj A'dam VI. Hillegom sindetenas.

Proponoj 6 kaj 7 estas kune pritaktataj. Arnhem atentigas, ke la abonantoj pagos pli ol la ponumera prezo estos; ili ne plu abonos, sed aĉetos ponumerajn ekzemplerojn. West-Graftdijk: Estas necese ĉar nun 2 kaj pli da ekz. de L.E. eniras en unu hejmon, ke ni plifaciligu la aliĝon de samhejmanoj. Gent deziras scii la prezojn por Flandrio. Maastricht forte subtenas proponon 7. Alings respondas, ke la ponumera prezo nur ekzistas propagandcele. Ni povos fiksi la abonprezon je 75 c.; al abonantoj estas pleje ekster nia movado kaj por tiuj ni ne bezonos tro malaltigi la prezon. Al W. Graftdijk k.a. li respondas ke en grandaj familioj ankaŭ povos esti pli da enspezoj ol en malgrandaj. Cetere ne la Fed. kotizo sed la sekcia kotizo estas la plej grava. Maastricht diras, ke ankaŭ temas pri infanoj. Alings respondas, ke la sekcioj havu apartajn aranĝojn por infanoj. La Fed.-estraro tamen estas preta post tiurilataj petoj aranĝi en okazo de neceso apartan kotizon por samhejmanoj laŭ la propono de W. Graftdijk, sed ne estas preferinde fari por tio proponon, ĉar tiam ni devas fari apartajn aranĝojn por tiuj, kiuj tamen deziras ricevi L. E. West Graftdijk konsentas kun la promeso de la estraro kaj reprenas la proponon. La 6a propono estas, post fikso de la abonprezo je 75 c. aprobata. Por Belgio valoras la nuna aranĝo pri la valuto. Maastricht kaj Brussel restas por abonprezo de f 1.— sed Arnhem reprenas sian amendon.

Proponoj 8 a., b. kaj c.
Prop. *a.* fariĝas superflua post akcepto de la propono pri S-ulo. Pri *b.* la prez. rimarkigas, ke nia ĵusfondita gazetarservo klopodas, ke tiuj novaĵoj aperu en la landaj gazetoj, tiel ke ĉiu povos legi ilin en sia gazeto. La propono *c.* ne estas praktike efektivigebla, neeblas agi juste, ĉar partoprenus spertaj kaj nespertaj kdoj. La pli spertaj iam havus avantaĝon. Pri *d.*, kune kun S-ulo aperas La Lernanto, en kiu tiaj humoraĵoj aperas.
Hillegom estas kontraŭ *a.* kaj *d.* por la propono *c.* se eblas, sed sen premioj. Pri *d.* li rimarkigis, ke nur aperas novaĵoj pri SAT, dum ekzistas multe pli granda organizo kun 15000 membroj, IPE, pri kiu ni legas nenion. La kongreso postulu, ke ni estu pli objektive informataj pri la ruĝa Esperanto-movado. A'dam X deziras scii, ĉu la gazetoj akceptas la sciigojn de nia gazetarservo. R'dam III opinias, ke ni ne metu sur la tagordon tiajn simplajn proponojn, kia propono *d.*
La prez. konigas, ke la redaktoroj de „Taalblad" ĉiam estas pretaj plenumi la petojn de la legantoj. Degenkamp, petite doni sian opinion, diras, ke li kelkfoje donis traduktaskojn, sed ke atingis lin tiom da alia materialo, kiun li nepre devas pritrakti, ke ne restas loko por traduktaskoj. La plimulto de la temoj envenintaj estas tiel gravaj, ke ni tiujn unue devas prizorgi. Zaandam reprenas sian proponon. Gent reprenas la proponojn *a* kaj *b* kaj la redakcio de „Taalblad promesas fari sian eblon pri propono c.
Alings respondas, ke en S-ulo ni trovos pli da sciigoj pri la internacia movado ol kiom ni povas doni. Estas por la amikoj de IPE pli agrable, ke ni silentu pri ĝi, ĉar se li farus tion ili certe ne kontentiĝas. Cetere tuj atingus nin multaj artikoloj kaj L. E. fariĝus disputorgano.
La prez. komunikas, ĉar la proponoj estas pli gravaj, ni do ne okazigu la paroladojn.

Paŭzo.

4a Kunsido.
Prezidas Krijt. Malfermo je la 13.50 horo.
Envenis salutletero de NAS. En ĝia organo „De Arbeid" aperos Esperanto-rubriko.

Ordopropono Heerlen.
La prez. diras, ke ni devas konsideri, ĉu ni havos la saman kongreson, kian ni havis pasintan jaron. Ni opinias, ke ne! Ni ankaŭ konsideru, ke nia organizo estas demokratia. Ni devas plenumi la en la kongreso faritajn decidojn. El tio ni prenas la fortojn plue labori. Inter la decidoj troviĝas la Apeldorna rezolucio. Laŭ ĝi ni agis kaj la kunveno de la Fed. Konsilantaro plene aprobis nian gvidadon. Ni ne montru la pugnon al niaj kdoj, sed estas kelkaj, kiuj ne sciis kamarade interrilati kun alitendenculoj. Tiuj necesigis la rezolucion. Estas malbone, ke estas proponoj celantaj nuligi la rezolucion. Ni opinias, same kiel la Fed. Konsilantaro, necese, ke la rezolucio restu. Se la kongreso malsame opinias, estas bone, ke oni elektu aliajn estraron kaj konsilantaron. La amendon *a.* ni transprenas. R'dam volas priparoli la proponon, sed Alings atentigas, ke ne estas organiza maniero priparoli ordoproponon; kiuj ja estas por aŭ kontraŭ nur simple voĉdonu tiel! Okazas tiel. La ordopropono estas aprobata per 1236 kontraŭ 344 kaj 51 sindetenaj voĉoj. Per la akcepto de ĉi propono la sekvantaj proponoj ĝis la 12a inkluzive estas forigitaj de la tagordo.

La proponoj 13, 14 kaj 15
estas kune pritraktataj. Utrecht opinias, ke la dua parto de sia amendo al propono 9 kune devas esti pritraktata, sed post atentigo de la prez. pri neneceso, reprenas ĝin. Haarlem diras, ke li ne deziras ofende prezenti proponon. Ne estas IPE, kiu instigis prezenti tiun ĉi proponon, nur deziro al internacia ligeco. Laŭ niaj statuto kaj regularo, kiuj ne estas plu federaciaj, ni ne povas aliĝi al SAT, ĉar tiu estas individua organizo; ni devas aliĝi al iu internacio. La sennacieca koncepto ne taŭgas. La kongreso akceptu la proponon. Hillegom opinias, ke pro la ordoprono ne estas eble libere diri siajn pensojn. Ni donu al ĉiu membro la liberon serĉi internacian kontakton, kie ajn li deziras, kaj rekomendas sian amendon. R'dam III bedaŭras, ke la proponintoj ne pli sennebule kaj pli klare priskribis siajn celojn, alie la proponoj certe estus forigitaj pro la ordoprono. Ili estas kontraŭaj al nia Fed. kaj la kongreso malakceptu ilin. Arnhem opinias, ke ne eblas aliĝi al internacio. En SAT estas loko por ĉiaj tendencoj. R'dam I ne aprobas la proponojn, tiaj proponoj ne aperu sur la tagordon, ĉar tio signifas grandan danĝeron por nia Fed. Li tre bedaŭras la akcepton de la ordopropono, ĉar li deziris montri sian opinion al la proponintoj de la forigitaj proponoj. Enschede diras, ke nur povas temi pri IPE, al kiu la apeldorna rezolucio malpermesas aliĝi. Krome ĝi kiel internacio ne povas akcepti unuopajn membrojn. Zaandam ne celas IPE, kelkaj membroj ankaŭ apartenas al UEA. En diversaj landoj oni deziras pli fortan internacian ligon. La sennacieca koncepto kontraŭas la marksismon, kiel la ĉeestantoj, kiuj plejparte estas marksistoj, povas konstati. La kongreso akceptu la proponon.

La prez. respondante, esprimas sian ĝojon pri la k-da diskutado. Se ni aliĝus al internacio ni devus fari tion al tendenca internacio kaj pro tio la Fed. tre verŝajne diskreviĝus. Se ni aliĝus al komunista, la socialistoj forirus; se al ia socialista, aliaj forlasus nian organizon. Ni ne imitu, sed iru propran vojon. La Fed. ne aliĝis al SAT, tio ne estas ebla kaj se ni aliĝus al IPE, ni agus kontraŭ la apeldorna rezolucio kaj la konvencio kun SAT kaj sekve *devigus* ĉiujn membrojn esti membro de tiu IPE. La estraro rekomendas, ke la kongreso malakceptu la proponojn.
Hillegom demandas, ĉu la rezolucio ankaŭ estos uzata kontraŭ eventuala fondota soc. internacio. Faulhaber respondas, ke kompreneble niaj membroj ankaŭ ne povas aliĝi al tia internacio. Konklude, do la proponoj ne estas efektivigeblaj.

Proponoj 16, 17 kaj 18.
La sekr. diras, ke ne estas preferinde, ke unu organizo okazigu petskribon kontraŭ alia. Pli bone estas serĉi kontakton. Petskribon oni nur uzu kontraŭ la registaro kaj aliaj oficialaj instancoj. Kelkaj gazetoj jam enpresigas niajn sciigojn. Esperanto-rubriko en grandaj gazetoj certe ne estas efektivigebla. Necesas por tio respondeca ĵurnalisto. Libervola kunlaboro por tio ne certigas regulan aperigadon. Ni turnu nin al diversaj samspecaj organizoj, kiel IvAO, Sindikato de instruistoj, Dageraad k.a. por komune klopodi havigi al ni aperigon de scienca paĝo prizorgata de la kunlaborantaj organizoj. Tiel necesas, ke aparta redaktoro respondecas pri ĝi kaj tiel ni povos sukcesi.
Apeldoorn havis malbonajn spertojn rilate petskribojn al neesperantistoj. Ili foje rericevis el 600 petojn nur 12. Eble estas tasko por la distriktoj.
